SZWECJA: „Svenska Esperanto-Tidningen” donosi w ostatnich swych numerach o nadzwyczajnym rozwoju Esperanta w Szwecji. Rozwój Esperanta w Szwecji przypisać należy w pierwszym rzędzie sukcesom, jakie osiągnęły kursy p. Andreo Ĉe. Obecnie wielką popularnością cieszy się Hindus p. Lakshmiswar Sinha, który obrawszy sobie Gävle za bazę operacyjną, objeżdża całą Szwecję

i wygłasza odczyty w języku esperanckim. Każdy odczyt cieszy się frekwencją setek słuchaczy.

WĘGRY: Békéscsaba. W dniu 30. 9. br. rozpoczęto w tut. Tow. Esperanto metodą Andreo Ce kurs języka Esperanto. Już w pierwszych dniach trwania kursu zgłosiło się 70 słuchaczy. Na uroczystość zakończenia kursu zaproszono prof. J. Mihalika, przewodniczącego XXI. Kongresu, który wygłosił w dniach 2. i 3. XI. br. dwa przemówienia o Esperancie w obecności 84 i 100 osób. Po kursie i pod wpływem przemówień prof. Mihalika dyrekcja miejscowej wyższej szkoły handlowej nosi się z zamiarem wprowadzenia Esperanta do pierwszych klas tej szkóły.

Tuszkiewicz Bronisław.

BIBLIOGRAFIO.

George Fox. Fondinto de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj). 1624—1690. Henry van Etten. Friends' Council for International Service 136 Bishopsgate, London, E. C. 2. 1924. Prezo 3d. — La broŝuro resume priparolas la personon de George Fox, kiu precipe en anglolingvaj landoj estas bone konata, kiel fondinto de kvakeroj. La lingvaĵo esperanta estas tre bona kaj la enhavo vere leĝinda por ĉiuj.

Dr. L. Dreher.

Sivaĝi. Originala teatraĵo de hinda esperantisto en Svedujo, kies nomo estas Lakshmiswar Sinha. Eldonita de Eldona Societo Esperanto en Stockholm. La prezo Kr. 1.50. Agrable mi legis tiun historian scenon de la 17 jarcento, kies Esperanto, kvankam iom sub angla influo, estas flua ĝuste pro sia angla koncizeco kaj simpleco.

Dr. L. Dreher.

Podróż po świecie dostępna dla każdego napisał Bol. Czechowski, Sosnowiec 1929. Cena nie podana. Broszurka propagandowa o 32 str. Na treść jej złożyły się krótkie artykuły, których autorami jest kilkunastu esperantystów z całego świata, mające dowieść potrzeby esperanta w międzynarodowych stosunkach. Jest to cenna broszurka, mogąca oddać wielkie usługi w propagowaniu naszego języka. Razem z dwiema książkami, omówionemi w ubiegłym miesiącu, jest dowodem, że ruch wydawniczy z zakresu literatury esperanckiej zaczyna się u nas w ostatnich czasach ożywiać dzięki inicjatywie prywatnej poszczególnych jednostek. Cześć im za to!

Theta.

Lasttempe aperis „Klasigita Terminaro de Esperanto“ kompilita de Eĉeno S. Cian kaj eldonita de Sanhaja Esperanto Asocio. Libreto 32 paĝa, kiu estas malgranda vortaro esp.-hina, enhavas en 27 ĉapitroj la plej ofte uzatajn ĉiutagajn vortojn. Ricevebla ĉe: Sanhaja Esperanto-Asocio, P. O. Box 1332. Sanhajo. Prezo: Dol. 0,20.

„Gemoj de la hungara popolmuziko“ — bele eldonitaj kelkaj hungaraj polaj kantoj, kun notoj. Aperis la unua kajero; eldonanto la Esperanto Grupo de la Hungara Nacia Asocio. Ricevebla ĉe: Dro Julio Lukács, VII. Pillangó-u. 13. Budapest. Prezo: 2.— pengő aŭ egalvaloro.

TRADUKA KONKURSO.

La plej bona solvo de nia lasta konkurso venis de s-ano Ludwik Krysta, Cieszyn. Jen ĝia teksto, ni nur ne ŝatis la pseŭdorimon „gluteĝata-frakasata“:

Bagatelajo.

Tia estas la afero:
 Vermon manĝas la pasero,
 La paseron kato kaptas,
 Hundo lastan manĝadaptas,
 Hund' de lupo gluteĝata
 De panter' lup' frakasata,
 La leono tiun batas
 Kaj leonon mortan ŝatas
 Homo, — lin la verm' en tero.
 Tia estas la afero.

La aliaj konkursoj: Brochwicz, S. Ch. (Lwów), inĝ. Chmieleński, „Nekotatulo“, Niedźwiedz, Orzech.

La plej proksima traduka konkurso aperos en la Januara numero kaj en havos tekston pollingvan frazeologian por plej ĝusta esperantigo.

Dr. L. Dreher. L. K-ano.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Ŝapiro, Lipowa 33, Białystok.
Konto ĉe PKO No 60.047.
OFICIALA BULTENO No 13.

PREMIOJ POR VARBADO. Laŭpromese ni publikigas la liston de premioj, konsentataj por varbado de novaj anoj.

Por varbado de nova Membro oni rajtas elekti unu el la premioj: A. Fundamento de Esperanto. B. Dro Zamenhof: Lingvaj Respondoj. C. Robert Kreuz: 500 Komercaj Frazoj. D. Kolekto de turismaj presajoj kaj gvidfolioj. E. Camescasse: Inicado Matematika. F. Verax: Elementa Fotografata Optiko.

Varbinte novan Membro-Abonanton oni rajtas elekti unu el la jenaj premioj: I. Slosilaro de Esperanto (kompleta kolekto, konsistanta el slosiloj en 15 lingvoj). II. Kreuz kaj Mazzolini: Komerca Vortaro (bindita). III. Dreves Uitterdijk: Miraklaj Aventuroj de Sinjoro Longkrurulo (kun 152 desegnaĵoj).

Varbinte novan Subtenanton oni rajtas elekti unu el la jenaj premioj: 1. Raymond Schwartz: Prozo Ridetanta. 2. Tri libroj el listo de premioj por frupaginto laŭ libera elekto. 3. Tuta kolekto de premioj por varbo de simpla Membro.

PREMIOJ POR FRUPAGO. Premion de frupago rajtas ricevi la membroj, kies kotizo alvenos al la Teritoria Oficejo ĝis plej malfrue 31. XII. 1929.

„POLA ESPERANTISTO“ POR UEA-NOJ. Ni memorigas, ke Membroj-Abonantoj de UEA rajtas ricevi „Polan Esperantiston“ je favoraj kondiĉoj. Ili pagas por tutjara abono nur 5 zlotajn anstataŭ 8 zl. Tiu favora abonprezo ne estas akceptata direkte de la Administrejo de „Pola Esp.“ Bonvolu pagi tiun abonmonon aŭ kune kun la kotizo aŭ aparte al la loka Delegito resp. al la Ĉefdelegito.

INSIGNOJ DE UEA. Insignoj por membroj de UEA estas riceveblaj ĉe la Ĉefdelegito por prezo de zl. 2,50, enkalkulinte la rekomenditan afrankon. La mono devas esti pagita je PKO No 60.047.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Decembro 1929 UEA kalkulis en Polujo 30 membrojn jam por la jaro 1930 (3 DM; 16 MA, 10 M, 1 Esp. Entrepreno).

NOVAJ DELEGITOJ. Ni informas pri jenaj novaj Delegitoj: ŜWIECIE n. W. D. Józef Żołnierz, gimnazia profesoro, ul. Dworcowa 38. TUCZYN (Wolyń) D. F-ino Leja Kornin, instruistino.

Provizore ne estas plu Delegito en Staszów.

Białystok, la 1. 12. 1929.

J. Ŝapiro, Ĉefdelegito de UEA.

DE LA REDAKCIO — OD REDAKCJI.

Tiu-ĉi n-ro dediĉita al memoro de nia Majstro aperas iom pli frue ol kutime.

AL ĈIUJ NIAJ ABONANTOJ, AMIKOJ KAJ SAMIDEANOJ LA REDAKCIO KAJ LA ADMINISTRACIO OKAZE DE LA KRISTNASKAJ FESTOTAGOJ KAJ DE LA NOVA JARO SENDAS PLEJ KORAJN SALUTOJN KAJ BONDEZIROJN.

Tiu-ĉi numero estas sendota al ĉiuj Redakcioj de la Esperanto-Gazetoj (laŭ jarlibro de UEA) kun varma peto pri daŭra interŝanĝado. Pripensu, ke autentikaj kaj baldaŭaj informoj pri Esperanto-movado en la tuta mondo estas nepre bezonaj por la bono de nia afero.

Okaze de la festo de la libro aĉetu almenaŭ unu esper. libron. Libreja fako de P. E. estas je Via dispono kaj atendas Vian mendon.

Korespondujac z zagranicą powinni niezwłocznie zamówić sobie „Polaj Kristnaskaj Kantoj“.

Estas menciinde, ke aperis tre grava verko: L. L. Zamenhof Originala Verkaro, kolektita de d-ro J. Dietterle, tre bele eldonita de F. Hirt et Sohn en Leipzig.

Ne forgesu renovigi la abonon por j. 1930! Pagu la abonon je nia konto PKO 406.660.

Abonu mem kaj varbu abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!

ROBOTNICZE STOWARZYSZENIE ESPERANTYSTÓW „PRACA — LABORO“ W POLSCE

(Adres Zarządu: ul. Marszałkowska 81, u adw. Litauera)

posiada stale na składzie następujące wydawnictwa dla nauki i propagandy pomocniczego języka międzynarodowego Esperanto:

- 1. Samouczki:** prof. Kronenberga 1,20 zł, Leo Turna niższy 1,25 zł, wyższy 1,50 zł. Carta-Borela z Kluczem i Rozmówkami (3 tomiki) 2,50 zł. Jana Tichawskiego dla kursów 7,50 zł. Grenkampa „Klucz” z bajką Andersena 0,50 zł.
- 2. Słowniki:** Antoniego Grabowskiego po 1,80 zł (esp.-pol. i pol.-esper.). Jana Zawady najnowszy „Pełny podstawowy” nakładu własnego zł. 2,50 dla członków Tow. Esp.
- 3. Propagac.:** prof. A. Czubyński „Esperantyzm” — cena zł. 3.—. Bolesława Czechowskiego „Podróż po świecie dostępna dla każdego” — cena 0,50 zł, Leopolda i Zofji Kronenberg: „Do społeczeństwa polskiego — dwa artykuły w sprawie Esperanta” — 0,60 zł. Pocztówki ilustrowane z grobem Dra L. L. Zamenhofa 0,30 zł, — z dziewczynką i napisem: „Mamusi, przez Esperanto chcę kochać dzieci całego świata” — 0,20 zł.

Zamówienia skierowywać należy na adres sekretarza: Jan Zawada, Miasto-Ogród Czerniaków, ul. Zaciszna 1. Warszawa, Konto PKO. 20845, dodając 10 procent na kosztą przesyłki.

Stowarzyszenie prowadzi też KURS KORESPONDENCYJNY — za opłatą 12 zł, płatnych ewent. w dwóch ratach z góry. Uczący się drogą korespondencyjną otrzymuje wskazówki do samouctwa, poprawianie wszystkich przez siebie zrobionych ćwiczeń z podręcznika i wszelkie z tem związane uwagi — aż do zupełnego opanowania języka.

Libreja Fako de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Smoleńska 9. Konto PKO. 406.660.

REKOMENDAS :

Albumo de Kraków (34 fotoj)	0.80
Gemoj de la hungara popolmuziko	3.20
Glumarkoj „Babel” 10 pecoj	0.10
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30.	
Kraków — Urbo de Jubilea Kongreso 1912	0.80
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Tichawski — „La Mondlingvo”, podr. Esp.	7.50
Zawada — Pełny podstawowy słownik j. Esp. (esp.-pol.)	4.00
La verkoj de Zamenhof:	
Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parte po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taurido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baharaŝ. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Baŭlcki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
Bennsels — Solandro	2.20
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Bultuis — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.30
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1.20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangfrapo	1.00
Fredo — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krijoj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel — Gyges kaj lia ringo	6.50
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kant — Al eterna paco	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karinthy — Morgaŭ matene	2.60
Kongreslibro de l' VIII en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lange — Libro de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Lippmann — Sprachliche Gutachten	2.00
Malgranda terbiblo	2.00
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	2.60
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.35
Privat — Vivo de Zamenhof	5.40
Ramo — En Svislando	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Schmidt — La amkonkurantoj	0.85
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Ariŝh, trad. Ant. Grabowski	1.40
Ŝapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Slosilo esper. en pola lingvo	0.60
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 elkz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	1.50
Vigny — La intervidiĝo kaj nekonita dialogo	0.90
Wiesenfeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Wysłouch — El lando de ruinoj	0.45
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.

ADAM GRZYMAŁA SIEDLECKI.

VERA HISTORIO
DE
DON JUAN

EL LA POLA LINGVO TRADUKIS
BR. KUHL.

KRAKÓW 1929.
EI.DONO DE „POLA ESPERANTISTO“.

ADAM GRZYMAŁA ŚIEDLECKI

VERA HISTORIO

DE

DON JUAN

LA POLA LINGVA TRADUIS

BR. KUHL

KRAKOW 1833

DRUKARNIA L. GRONUSIA I SKI W KRAKOWIE.

Antaŭparolo.

Preskaŭ ĉiu verkanto, se li estis en Hispanujo, tuj trovas en iu monahejo nepublikitajn ĝis nun dokumentojn rilatantajn al la mistera figuro, kiun oni konas nur laŭnome: figuro de don Juan.

La aŭtoro de tiu ĉi rakonto ne havis bedaŭrinde ĝis nun la okazon esti en Hispanujo. Mi intencas veturi tien ne pli frue ol en venonta jaro; ĉar tamen la jenan rakonton mi deziras jam nun dediĉi al don Juan, do mi estas en situacio de homo, kiu devas antaŭvidi ne nur tion, ke li dokumentojn pri don Juan en unu hispana monahejo trovos, sed ankaŭ devas antaŭvidi la plenan tekston de la diritaj dokumentoj.

Konsolas min la cirkonstanco, ke mi ne estas la unua aŭtoro troviĝanta en simila situacio. Unu el miaj plej talentaj kolegoj-verkistoj, Christian Dietrich Grabbe verkis sian dramon pri don Juan kaj Faŭst neniam estinte en Hispanujo. La entuziasmo, kiun li sentis por la hispana raso, tiris lin ofte al tiu sunplena lando; malhelpis lin tamen ĉiam la cirkonstanco, kiu videble estis karakteriza ankaŭ por la romantikaj literaturistoj kaj kiun biografiisto de mia kolego per malmultaj vortoj difinis: *monon Grabbe ne havis.*

La aŭtoro de tiu ĉi „Vera historio de don Juan“ ne estas beletristo fakulo. Lia fako estas pli kritiko kaj analizo de verkoj literaturaj. Tiaspecaj verkistoj sian idealon vidas ne en romano, sed en historio de l'literaturo. Tial la dokumentojn, kiujn mi havos la okazon retrovi en proksima jaro en unu malmulte konata monahejo sur la vojo de Valencia al Burgos, mi zorgos prilabori science, t. e. ekskluzivigante la malnecesajn elementojn de subjektivismo, kiel tion ĉe la sciencaj verkoj postulas la Sciencaj Institutoj.

Enkonduka noto.

La dokumentoj, kiujn mi havos la okazon retrovi en tiu malmulte konata hispana monaĥejo, formas specon de libro konsistanta el 9 folioj sufiĉe diversformaj.

La dimensioj de longo kaj larĝo en laŭvica ordo estas sekvantaj

cm	cm
9	× 8
12	× 10
16	× 12
3	× 12
16	× 9
19	× 6.

La longon kaj larĝon de restintaj folioj malfacile estas por mi citi, ĉar ies mano disŝiris ilin oblikve de dekstra supra angulo laŭ diagonala (pli malpli) linio al maldekstra malsupra angulo.

Ĉu la diritajn tri foliojn disŝiris iu el la historiistoj de l' literaturo, ĉu individuo staranta ekster la sfero de l' esplorantoj, mi ne scipovis diveni. Ankaŭ devas resti almenaŭ nun por ni malklara la afero, por kiu konkreta celo la diritaj kartoj estis elŝiritaj. Eble la estontaj esploristoj klarigos tion.

Oni elŝiris la kartojn kun forto, kvazaŭ pro urĝo, la ŝir-
 linio ne havas do difineblan geometrian esprimon: nek linio
 rekta, nek regule kurba. Oni povas nur konstati, ke la ŝiro
 estas ŝirforma.

La kartoj en la libro pri don Juan estas skribitaj per
 substanco nigra, eble inko. Kelkaj signoj permesas konkludi,
 ke al la skribado oni uzis anserplumon. Kun plena certeco
 estas permesite aserti, ke oni ne uzis skribmaŝinon.

Eble pro tio, ke en la epoko de anserplumo oni ne ko-
 nis ankoraŭ la skribmaŝinojn.

Post tiuj enkondukaj rimarkoj ni povas alpaŝi al la ci-
 tado de la laŭvorta teksto.



Karto unua.

„La senkulpe akuzitan pro troa delogado de virinoj nobelon don Juanon de Pahobas mi konis persone. Lia genta nomo estis d'Asenini. La alnomo de lia gento estis: An Quodras Buambo dal Quadarpuirille Metos.

Li estis junulo de meza kresko kaj ne bela. Juĝante laŭ lia malgaja vivo oni povas diri, ke la malfeliĉo de l'nobelo de Pahobas estis liaj okuloj. Kiomfoje li alrigadis iun homon, al tiu homo devis ŝajni, ke don Juan parolas al li per la okuloj: „mi adoras vin“.

La viroj baldaŭ persvadis al si, ke kulpaj estas la okuloj de certa konsisto kaj koloro tute fizika. Tamen la virinoj neniam persvadi al si tion permesis, asertante same kiel iu malutila moralisto, ke „la okulo estas sendito de l'animo“.

Antaŭ mi, modesta servisto de Dio, don Juan multfoje plendis, okazadis, ke pro diversaj kaŭzoj li malamegis iafoje iun sinjorinon, ke lia animo en tiaj momentoj plena estis je deziro malfavora por ŝi, ke li deziris elkore diri al ŝi ekz.: „por ke ci krevu“ kaj jen kiam li kun tia deziro en la koro alrigardis ŝin, sinjorino tiu, se ŝi eĉ estus senlime malkvietiĝinta, tuj sereniĝis, prenis lian manon kaj parolis:

— Viaj okuloj ne mensogas. Jes, mi kredas, ke vi min amas.

Kiu estas nobelo, tiu komprenas, ke al sinjorinoj en tiaj momentoj ne decas nei. Kaj la kavaliro d'Asenini ne neis.

Post kelkjara agado sur tiu kampo don Juan jam tiel estis malplezurigita per la speco de sia vidsento, ke li venis foje en nian monahejon por konsiliĝi ĉe patro Vincenzo. Tiu, kiel al ĉiu estas sciata, konis la herbojn kaj al multaj kripluloj helpis. Longe ili interkonsiliĝadis. P. Vincenzo provis eĉ doni al li dekoktojn de urtiko, miksitajn kun lepora brasiko, sed tio ne helpis.

Kiel multjara konfesprenanto de don Juan mi povas atesti, ke tiu kavaliro multon, multon suferadis en la mondo pro siaj okuloj. Estu tio kalkulita al li antaŭ la Eterneco. Amen“.

Rimarko I. La nomo Asenini montras, ke la familio de don Juan estis itala. La vorto „aseni“ en la malnova toskana dialekto signifas pli malpli: „facilanima“.

Rimarko II. La biografiisto de don Juan en sia raporto ne precizigis, de kia speco estis tiuj malkompreniĝoj dum kiuj li trovadis sin en la stato de „deziroj malfavoraj“ por la sinjorinoj. Verŝajne estas, ke ĝi estis malkompreniĝoj de pure ideala naturo.

Karto dua.

„Oni ne povas diri, ke nur malbonaj sortoj gardostaris ĉe la vivo de don Juan.

Ĉar se ni post profunda kosiderado devas nomi liajn okulojn donaco de malfavoraj sortoj, do tamen nia pozicio kaj la talaro, kiun ni portas, devigas nin aserti, ke super la lulilo de lia animo staris ankaŭ anĝelo kun la blankaj flugiloj. Kaj tiu anĝelo ekloĝis en li; en la homa lingvo ĝi nomiĝas la komplezemo de don Juan.

Laika kronikisto inklinus eble aserti, ke tiu komplezemo estis samtempe malutila por tiu kavaliro kaj ne unu malfeliĉon en lia vivo kaŭzis, sed por refuti tiajn asertojn sufiĉas rememori, ke laikaj verkistoj kutimas juĝi ĉiujn aferojn laŭ vidpunkto tro tera — kaj tial eraras.

Komplezemo bonkora de l'nobelo d'Asenini estis de supera speco, kio klare jam pravas, ke sian komencon ĝi prenis de lanugo de l'anĝelaj flugiloj.

Eble sole la uzo, kiun don Juan faris de sia boncoreco, estis ne nepre mistika, eble estis eĉ tro surtera. Kaj tio estis eraro, tio estis fatalo.

Ĉar la komplezemon kaj bonkorecon montradis tiu kavaliro plej ofte al la virinoj. Ne ekzistis afero,

kiun li estus povinta rifuzi al virino. Kiel eremito mi ne scias, kies estadis la kulpo, ke lia komplezemo finiĝis ĉiam per amo.

Certa sinjorino, kun la nomo de donna Eva, ekvidis foje don Juanon, tiam ankoraŭ tre junulan kaj konatiĝis kun li.

Konatiĝinte ŝi komencis kun li tian interparolon:

— Delonge mi vidas, ke renkontante min vi alrigardas min tro arogante.

— Mi, sinjorino?

— Jes, arogante, ĉar ame.

— Mi ĵuras je l'honoro, ke ne...

— Ne trouzu, junulo, la honoron, ĉar honoro estas trezoro. Ne imagu tamen, ke min oni povus venki.

— Do ja mi eĉ ne en sonĝo —

— Ne interrompu min. Min oni ne povas venki — per la rigardoj mem, por mi oni devas pereji, aŭ plenumi eksterordinarajon. Respondu al mi: ĉu vi veturus kun mi trans marojn?

— Sendube — respondis la junulo, ĉar vekiĝis en li lia bonkoreco kaj denaska servemo, tiu servemo kontraŭ la kunfrato.

— Ĉu vi ĉasus por mi leonon?

— Eĉ tuj.

— Ĉu vi ekrajdus furiozan ĉevalon?

— Alkondukigu ĝi al mi.

— Kaj vi rigardus okulon kontraŭ okulo al sorĉistino?

— Kun plezuro.

Tiu sinjorino postuli tamen nek viziton ĉe sorĉistino, nek senduban morton dum rajdo sur sovaĝa ĉevalo, nek ekskurson en la landon de Maŭroj, kie oni povas renkonti leonon, nek serĉadon sur la oceano de postesignoj de Kolumbo, sed post ĉiuj ĉi demandoj konkludis:

— Se tiel estas, do amu min.

Kaj oni diras, ke li ekamis ŝin.

Tiu sinjorino tamen parolis poste al siaj amikinoj:

— Jam li eniris la ŝipon naĝontan al Fez, por tie sur la sabloj dezertaj ĉasi leonojn, ĉar tiel li amas min.

Post iu tempo alia sinjorino postulis pruvojn de kuraĝo kaj komplezemo. Don Juan montris kontraŭ ŝi la saman pretecon. Oni parolas, ke tio denove finigis per amo.

Donna Eva komencis tiam disrakontadi, ke don Juan estas malnoblulo.

— De senduba morto mi savis lin, ĉar jam li estis ekrajdonta sovaĝan virĉevalon andaluzian sen selo kaj nebriditan tiel, ke li estus frakasinta la kapon kontraŭ la rokoj — kaj nur mi per la propraj manoj lin detenis... kaj tiu sendankulo anstataŭ danki delogis min kaj nun jen li forlasas min por tiu sorĉistino...

Kaj kie nur ŝi povis, ĉikanis lin.

Tamen mi, modesta monaho sed longjara konfidulo de pento de tiu kavaliro, kuraĝas aserti, ke se

donna Eva estus ekvoĝinta en la teron de Aztekoj, tiam don Juan estus veturinta al Aztekoj, se ŝi estus ordoninta al li rigardi en la okulojn de tigro aŭ alia bestego — li rigardus — ĉar tamen gvidata de stranga deziro ŝi elektis la amo kun li, do li ankaŭ konsentis je l'amo.

Ĉar tiu homo havis verŝajne almenaŭ duoble pli grandan perimetron de l'koro ol la koro de aliaj mortemuloj, do ankaŭ la bezono bonfari estis en li pli granda ol en aliaj homoj.

Unu fojon li eksciis, ke iu forlasita kaj iom malbela, sed ankoraŭ en aĝo de amo estanta virino de nenju estis amata kaj ke la viroj ridis pri ŝi. Li ekkompatis je ŝi kaj komencis fari gestojn pruvontajn pri lia amo al ŝi.

Ĉe mi, ermito, plenumis tiam pekon de rapideco, ĉar mi eksplodis kolere kontraŭ li:

— Stultulo! — mi diris: — ŝi ja estas monstro!

— Patro spirita — respondis tiam la nobelo: — oni ne devas ĉiam pensi nur pri si.

Longe post tiu respondo mi restadis en teologia malkvieto: ĉu konsideri tiun amon de don Juan kiel pekon, ĉu kiel bonfaron?

Ne estas donita al mi klereco en konsiderado de teraj aferoj, sed en la silento de muroj pensante pri mia malfeliĉa don Juan mi kuraĝas supozi, ke ne estis certe alia la biblia Samaritano...

En la vivo de don Juan tiel nur ĉio komplikiĝis, ke sur sia vojo li renkontadis tro malmulte da vunditoj kaj anstataŭe tro multe da virinoj... En tio estas la diferenco inter li kaj la Samaritano el la Skribo.

Sciante pri ĉiuj liaj okazajoj mi kuraĝas diri, ke lia samaritana boneco kaj komplezemo multajn, tre multajn kaŭzis al li dolorojn. Estu tio kalkulita al li antaŭ la eterneco. Amen".

Rimarko: El la cititaj en tiu ĉi karto okazajoj montriĝus por supra esploro, ke en la vivo de don Juan estis cirkonstancoj, en kiuj la virinoj okupis postenon de atakanto Reale tamen konsiderante tio estas neblajo. La virino estas ĉiam nur viktimo de vira ruzo kaj ne ekzistas ekzemplo, ke ŝi estus deloginto. La plej bona pruvo estas, ke la virinoj mem tiel certigas.

Pro tiu ĉi pruvo oni devas supozi, ke la priskribitaj okazajoj havas simbolan sencon. Donna Eva kaj aliaj virinoj estas — metaforoj. Kion ili estas simbolontaj, nun malfacile estas decidi. Ni esperu, ke la scienco solvos ankaŭ tiun malfacilaĵon.

Karto tria.

„Kiel oni scias, certa donna Anna plej multan malbonon kaŭzis al la nomo de mia pentulo, kavaliro d'Asenini.

Mi havis jam okazon legi tragedion pri tiu amo. Aŭtoro de l' tragedio sendube estas maljunulo, ĉar li ĉiumaniere klopodas malfamigi don Juanon kaj spite lin — glorigi la virtojn de donna Anna.

Certe, verko de l'arto devas iomete mensogi, tamen por kio mensogi supermezure? Tial mi riproĉas al la aŭtoro, ke li ne demandis aŭ min aŭ iu alian, sciantan, kiel efektive la afero okazis.

Kaj ĝi okazis tiamaniere:

Tiu donna Anna havis patron severan kaj tre pri si fieran. Fieran pro tio, ke li opiniis sin neerara. Tiaj homoj estas multaj, eĉ inter la kontraŭpapistoj. Fiera pri sia neeraremo la patro ordonis al la filino interŝangi la ringojn kun iu don Oktavio.

Don Oktavio serĉis ligon kun donna Anna por havi subteno ĉe la Kortego, kie la patro de lia fianĉino posedis multoblajn influojn; ne rapidis tamen don Oktavio kun la donacoj de Amoro.

Tio kolerigis donnan Annan.

— Se mi pro ĉiopova kaj nepardonema ordono de l' patro devas edziniĝi je tiu viro, — ŝi cerbumis: — do li almenaŭ amu min. Li min almenaŭ amu, se mi lin ne amas.

Sed don Oktavio estis kvazaŭ ŝtono.

Por agi kontraŭ tio decidis la virgolino vekti en la fianĉo jaluzon.

Tiutempe don Juan estis jam viro promenanta en gloro. Sufiĉis, ke li interŝanĝu vorton kun virino, kaj jam ombro faladis sur ŝian bonŝamon.

(Stranga afero, ke tio ne malfervorigis la vifinojn al kavaliro d'Asenini).

Jen do donna Anna decidis profiti tiu ĉi malbonan gloron de don Juan.

Ŝi iris foje sur la strato kun sia fianĉo kaj de kontraŭa flanko iris don Juan. Donna Anna pafis al li per la okulo tiel signifplene, ke ankaŭ don Oktavio rimarkis.

Tamen don Oktavio — nenion.

Ĉagrenigis tio la noblan virgulinon.

— Ne estas alia rimedo, mi devas konatiĝi kun don Juan. Tio sufiĉos por vekti la jaluzon, — tian ŝi faris decidon.

Ŝi profitis la plej unuan okazon kaj mem alparolis la danĝeran kavaliron:

— Pardonu nekonata sinjoro, mi ne scias, kie estas la strato de Torros, ĉu vi ne bonvolus montri ĝin al mi.

— Bone, bone — respondis grumble don Juan kaj iris plue, ĉar jam li estis en la aĝo de sperteco

kaj sciis, kiom signifas, kiam virino demandas pri de Torros aŭ io simila.

Donna Anna ekflamis per kolero kaj decidis puni la kavaliron.

— Ho vi kuragulo, vi ankoraŭ kuŝos ĉe miaj piedoj — kaj mi diros tiam al vi: bone, bone!

Ŝi estis ja prava filino de sia patro kaj havis grandan fieron pri si.

Okazis do, ke kiam ili renkontis sin dum amuzo ĉe amikino de donna Anna, tiu denove komencis al don Juan:

— Vi evitas min sinjoro kaj mi scias kial: jen vi timas, ke mi venkus vin en la luktoj de amo.

Sed don Juan respondis denove:

— Bone, bone.

Kiel mi nome rimarkis, li ne estis plu novico en servo al la virinoj — kaj sciis ĉion kaj ĉiel.

Vidante donna, ke de tiu flanko ŝi ne sukceson, komencis rekte:

— Venu hodiaŭ post la amuzo en nian ĝardenon, mi estos tie. La najtingaloj mirinde kantas en nia ĝardeno.

-- Fraŭlino ĉarma, amason da najtingaloj en la vivo mi aŭdis — (tie ĉi li ekĝemis peze) — do ili min ne plu altiras.

La fiero pri si virgulino je tio malkaŝe:

— Kaj mi?

— Kio?

— Kaj mi ĉu vin ne altiras?

— Certe jes. Neniu virino min tiel allogis.

Tion dirinte li volis foriri.

Sed donna Anna kaptis lin je l' spado.

— Do venu. Venu!

Kaj kurbigis la okulon, kiel tion la virinoj kutimas en konataj momentoj.

— Virgulino kara, se vi sciis, kiom da aferoj mi havas ankoraŭ por prizorgi! — komencis elturniĝi humile nia kavaliro.

Tamen tiu ne volis cedi:

— Venu — ŝi parolis: — kaj venu.

Kaj kiam li ankoraŭ hezitis, tiu ne hontis ekargumenti:

— Feliĉo de mia vivo dependas de tio!!!

— Se tiel estas, do certe. Kvankam eble iu alia junulo, ne nepre mi?...

— Ne: vi, nur vi...

— Se jam alimaniere ne povas esti...

Donna Anna ektriumfis en la animo.

Don Juan iris en la ĝardenon. — Kio okazis post tiu iro, ne estas al mi permesite konfesi; sufiĉas, ke don Oktavio fariĝis tiel ĵaluza, ke li resendis al la fianĉino la ringon, kaj poste pereis el la mano de don Juan... Donna Anna tamen rakontis al la historiisto, ke kavaliro d'Asenini trouzis ŝian konfidon".

Rimarko: Ĉar la supra rakonto ne konsentas kun tio, kion pri don Juan scias la historio de l' literaturo, do ni devas konsideri ĝin elpenŝajo.

Duaflanke tamen la supra rakonto en la momento de l' publikigo fariĝos malgraŭ ĉio parteto de historio de l' literaturo. Pro tio oni ne povas ĝin nomi elpensajo.

En kolizio de tiuj kontraŭdiroj oni devas halti enmeze kaj difini la raporton de nekonata monaĥo denove kiel simbolon aŭ ekz. sintezon.

Multaj kritikistoj ĉiam nomas tiel aron da ideoj, pri kiuj nenio alia estas direbla.

Karto kvina.

„La bezono dungi Leporellon estis simple urĝa, ĉar kavaliro d'Asenini troe jam kun la fluo de jaroj estis ŝarĝita per la ama bonvolemo de virinoj.

— Mi fariĝis moda — parolis don Juan: — kaj oni scias, kio estas modo por la virinoj. Se la modo ordonus al ili promeni somere en peltoj kaj vintre en ĉemizoj, ili promenus. Do tia malfeliĉo okazis, ke inter la virinoj de v a s, ke ili min favoru.

Don Juan estis homo humila kaj konfesadis malkaŝe, ke multaj aliaj kavaliroj estas pli indaj je tio, tamen ili trovis neniam tiun favoron de virinoj. Aŭ ili trovis en proporcio nejusta al la ecoj de siaj koroj.

— Kaj mi naskiĝis jam en tia malgaja horoskopop de steloj! — li sopiris.

Kaj efektive: unuj el tiuj virinoj ligiĝis kun don Juan por spiti al siaj edzoj.

Aliaj tamen pro la amikeco al siaj edzoj, ĉar ili konsciis, ke ili estis ekz. grumblemaj, grumblecon sian ne scipovantaj deteni kaj la edzoj deziris kvieton kaj liberan menson, kiun menson ili eluzadis por la profito de l' ŝtato kaj Monarko.

Aliaj ankoraŭ ligiĝis al don Juan por kreski en prezo. Precipe virinoj kiel tiaj vel kurtizanoj. „Don

Tre multaj virinoj perfidis don Juanon ĝuste kun Leporello.

Bonkora don Juan pardonis tion al li. Ĉiu perfido de Leporello pligrandigadis nur ilian reciprokan amikecon“.

Rimarko I. El la supra prezento montriĝas, ke la nekonsata monaho-rakontinto ne posedis en sia pensado sufiĉan sciencan metodon. Se li estus posedinta minimumon da metoda pensado, li sciis, ke la scienco postulas antaŭ ĉio ĉiuflankan klarigon de ĉiu afero, por ke nenio restu duba.

Dume la monaho-historiisto ne klarigas al ni, kiaspecan anstataŭon prizorgis Leporello?

Deziderante helpi al antikva historiisto ni konstatas, ke ni ankaŭ ne scias.

Ne sciante tamen ni provas starigi vicon da hipotezoj apogante nin je analogioj de aliaj anstataŭoj konataj al ni el la historio de l' literaturo.

Do:

a) La anstataŭo de Leporello povis esti ekz. simila al la anstataŭo de Patrokles ĉe Aĥilles. (Iliado, kanto I kaj IV). Tio estas la anstataŭado ĉe la demetado de l' kiraso.

b) Anstataŭo simila al la anstataŭoj de Vergilius ĉe Dante. (Vidu: „Dia komedio“, ĉiuj tri partoj). Ĝi estis anstataŭo en la konado de geografio.

c) Anstataŭo simila de Mefistofeles ĉe Faŭsto. (Vidu Goethe). Faŭst ne sciis, kiel scienculo, delogi la virinojn, do en la enkonduka akcio anstataŭis lin Mefistofeles.

d) La anstataŭoj de Leporello povis esti de tiu speco, kiun plenumis la du sekretarioj de Edmond Rostand ĉe Edmond Rostand: ili okupitaj estis per kombinado de reklamo por la kreigitaj verkoj de l' majstro.

K. m. a.

Rimarko II. Sufiĉe malpreciza rimarko, ke Leporello estis vicestro de don Juan, montras, ke don Juan okupis ian altan ŝtatan oficon.

Karto kvara.

„Kiam la devoj de konata speco troe jam komencis lacokupi la tempon kaj kapablojn de don Juan, tiam nia kavaliro faris interkonsenton kun iu junulo, nomita Leporello.

La enhavo de tiu interkonsento estis, ke Leporello prizorgis parton de okupoj de don Juan, precipe en sferoj malpli superaj.

Danke al la junulo Leporello, la nobelo d'Asenini havis momentojn da ripozo.

— Mi povas fine nun iun kvaronhoron tage dediĉi ankaŭ al intelektaj aferoj — li parolis farinte la kontrakton kun Leporello.

Efektive oni devas konfesi, ke depost tiu tempo don Juan dormadis iafaje iun kvaronhoron tage.

Erare informitaj verkistoj kaj aŭtoroj asertas en siaj tragedioj, ke Leporello estis armilportisto de don Juan.

Ĝi estas eraro. Leporello estis pli ĝuste speco de vicestro de don Juan. Li agis proprapersono, sed en la nomo de l' kavaliro d' Asenini.

Poste montriĝis, ke li estis prava fripono kaj sian agadon disetendadis ekster la limojn de l' donita al li sfero.

Juan mem amis min" — jen estis por neunu tavora testimonium.

Estadis ankaŭ tiaj virinoj, kvankam malofte ili sin trovis, ke iu el ili iafoje ne estis plene certa, ĉu ŝi estis la plej bela virino de Hispanujo. Amikiĝo kora kun don Juan estis por ili pruvo, ke tiu momerto de necerteco koncerne la belecon estis sole malbona songo. Kiam tio jam okazis, ke don Juan alrigardis unu aŭ alian dubantan, tiam ŝi plaŭdis ĝoje kaj parolis al si:

— Don Juan ja ne amus min, se mi ne estus la plej bela virino de Hispanujo.

Tiamaniere en miaj tagoj vivis samtempe amasego da plej belaj virinoj en Hispanujo.

Estadis ankaŭ aliaj.

Tiuj ne tiom deziris, ke don Juan ilin amu, kiom ke li duelu je spadoj kun iliaj edzoj.

— Tiel li amis min, ke li duelis pro mi — ili rakontis poste al siaj filinoj, kaj eĉ al nepinoj.

Iuj el ili evitis eĉ efektive la pekon, sed la duelon ili ne preterlasis.

En sia matura aĝo, kiam kavaliro d'Asenini ne plu estis tiom stulta — li serĉis ofte la duelon kiel breton de savo.

Kiam okaze li estis malkontenta pro la vivo kaj iu virino logis lin, tiam don Juan zorgis, ke ŝia edzo ofendiĝu kontraŭ li antaŭ iu proksimiĝo kun ŝi.

La edzo provokis don Juanon. Tiu venis al la placo, kaj kiam la honoro estis kontentigita, tiam d'Asenini juris al la kontraŭulo, ke li ne plu konos lian edzinon.

Kaj la juron neniam rompis tiu ĉi kavaliro. Estu tio kalkulita en liaj meritoj.

— Mi elturniĝis per duelo — li parolis post la afero kaj ĝojis kiel infano.

Oni ne povas tamen aserti, ke edzoj de tiutempaj virinoj ne profitu ruze la duelojn de don Juan.

Fama fariĝis precipe unu el la edzoj nomita Fernando.

Tiu ĉiumaniere klopodis tiel ion fari por disiĝi de sia edzino.

Kompreneble ne estas vero, kion diras la legendo, ke li eĉ preĝopetis pri baldaŭa morto de l' edzino, ĉar li ne deziris al ŝi morton, nur disiĝon. Vere tamen estas, ke jen tiel, jen alimaniere li malvolontigis sin al ŝi.

Dumvintre, kiam longaj estas la vesperoj, li dediĉadis sin al revoj, ke jen revenis tempoj malkvietaj, kiujn oni nomas romantikaj. ke jen perfortuloj atakas malpli defendajn kastelojn kaj kaptas seŝnoraĵn, ke jen hodiaŭ post momento ili invados lian palacon kaj kaptos lian edzinon.

— Mi eĉ fingron ne kurbigus defende -- Li respondis al sia revo.

Por ĉiu eventualaĵo, se-se tamen revenus la romantikaj tempoj, por ĉiu, ni ripetas. okazo li ordonis la kanonojn sur la remparoj difekti.

— Nun la defendo neebla! — li ridetis serene al siaj revoj.

Havis foje grandan eksciton kavaliro Fernando, ĉar li eksciis, ke en proksimaj montoj vagadas iu

frenezulo nomata don Quixot de la Mancha kaj vagante proklamas: „mi faras ordon“.

— Se li faras ordon — cerbumis Fernando: — do eble li iel fine en la afero de mia amata edzino ion tian...

Por saketo da dukatoj li dungis kelkdek homojn amikajn, kiuj promesis kredigi al don Quixot, ke Fernando turmentas sian edzinon — kaj la sinjorino deziras liberigon.

Kio okazis plue mi skribos sur la sekvanta karto, ĉar, kiel vi vidas, mankas jam loko sur ĉi tiu“.

Rimarko: La raporto rakontita sur ĉi tiu karto donas okazo por neniuj rimarkoj.

Tial ni devas ĝin konsideri el la scienca vidpunkto kiel neekzistantan.

Karto sesa.

„Komence ĉio sukcesis prospere. Don Quixot eksciis, ke Fernando turmentas la edzinon, iris kontraŭ lia kastelo, kie la pordego estis jam larĝe malfermita, enfalis kun sovaĝa krio, frapis per lanco la kanonojn, deklaris ilin per tio konkiritaj — kaj eniris en la salonojn.

— Ci estas la fripono Fernando? — li demandis.

— Mi estas.

— Ci turmentas mizerulinon cian?

— Mi.

— Venigu ŝin, ĉar mi liberigos ŝin de ci kaj prenos kun mi.

Fernando kvazaŭ sur flugiloj de l' facila vento kuris en la kortegan virinejon kaj rapide altrenis sian edzinon.

Tamen ekvidinte ŝian vizaĝon don Quixot diris al Fernando:

— En similaj cirkonstancoj mi ne miksas min en aferojn, kiuj min ne koncernas — kaj li eliris.

Fernando restis malĝoja kaj diris al la edzino:

— Vidu, mi vin defendis.

— Mi mem min defendis — respondis arogante la virino.

Revemulo Fernando perdis jam ŝajne ĉiun esperon, kiam oni rakontis al li pri la agoj de don Juan. Fernando longe cerbumis, ĝis fine elpensis.

Kaj li elpensis bone.

Tiel li nome faris, ke post longaj penoj li trovis fine sian edzinon duope kun don Juan. Komencis kverelon. Kavaliro d'Asenini jejuris, ke li pasigis la tempon en deca interparolo (kaj li ne mensogis). — Fernando ne kredis. Provokis don Juanon al duelo. Ĉe torĉoj nokte ili stariĝis sur la postenoj.

Post la unua krucigo de l' spadoj Fernando falis.

Tiam aperis kvazaŭ elsub tero la amikoj de Fernando kaj atakis mian pentofaranton. Cedante don Juan venis en la kastelon de Fernando, kie la ploranta pro la perdo de Fernando edzino konfesis al li, ke ŝi klopodos esti al li dankema.

Kaj la amikoj de Fernando prenis lian korpon, metis sur veturilon kun la fojno kaj transportis en malproksiman landon.

Tamen ili ne transportis la kadavron, sed vivan kavaliron, ĉar Fernando simulis la morton kaj la sango ŝprucanta de lia brusto estis sango de bovo enverŝita en vezikon.

En malproksima lando Fernando komencis gajan vivon kaj al la amikoj konfesis:

— Kvankam mi perdis la kastelon kaj bienon, — mi ne bedaŭras.

La kaŭzo por nebedaŭri estis tiom pli facila, ke sian kastelon kaj bienon Fernando vendis unu tagon antaŭ la duelo.

Koncerne tamen don Juan tian Fernando pri li esprimis opinionon:

— Ne don Quixot estas frenezulo, sed don Juan. Kaj tiun opinion ĝis la morto li ne ŝanĝis.

La informon pri la ruza spritaĵo de don Fernando rakontas ĝis nun neniun tragedio. Kun iu stranga obstino la tragedioverkistoj asertas, ke la edzoj de la delogataj de don Juan edzinoj estis figuroj plendindaj.

Oni rakontis al mi ankaŭ, ke en iu el prezentaĵoj pri don Juan, per kiuj teatroj nutras la amasaĉon avidan je vidaĵoj, ke en iu el tiuj artifikoj montrata estas sur la sceno ŝtona figuro de Komandoro kvaŝaŭ de patro de donna Anna.

La aŭtoro de tiu teatraĵo babilis, ke li estis patro de donna Anna kaj ke don Juan mortigis lin en duelo kaj poste eniris dum festeno tiu ŝtona figuro de tombo de Komandoro kaj per marmora manpremo senvivigis don Juanon.

Ĝi estas eraro.

La patro de donna Anna ne estis komandoro kaj koncerne la morton alia estis la kaŭzo.

Oni parolis foje al li:

— Ne manĝu tiun ĉi fiŝon, kiun vi havas sur la la plado, ĉar la fiŝo estas nefreŝa.

Tamen konfida je si kaj spite ma ne volante, ke oni lin suspektu, ke iu povas direkti lin, ekflaris la fiŝon kaj respondis:

— Al vi nur ŝajnas, ke ĝi estas nefreŝa, ĉar vi havas malbonan flarsenton.

Kaj spite li formanĝis la tutan fiŝon.

Kaj tri tagojn poste li mortis.

Liaj lastaj vortoj estis:

— Ne la fiŝo estis kulpa, sed la pneŭmonio.

Komandoro tamen estis ne iu alia, nur la antaŭa fianĉo de donna Anna, don Oktavio, kiu pereis en la duelo kun don Juan.

Efektive: la ŝtona figuro de lia tombo venis al la festeno de don Juan kaj premis la manon de kavaliro d'Asenini.

Tamen ĉar mi estis atestanto de tiu festeno kaj de tiu manpremo, do mi povas kun juro atesti, ke la ŝtona figuro diris tiam:

— Dio rekompencu vin, amiko.

Por kompreni tiujn ĉi vortojn oni devas scii, ke antaŭtagon de tiu festeno donna Anna edziniĝis je alia viro...

Kaj kiam la spirito de don Oktavio el la transmondoj ekvidis, kiajn aventurojn tiu virino aranĝis al sia edzo jam en la unua tago de l' geedza vivo, ĝi eksentis la ĝojon, ke ĝi troviĝas en alia, ne en ĉi tiu mondo.

Tial lia figuro malsupreniris de la tombo por danki por tiu ĝojo al la kaŭzinto de lia foriro de tiu ĉi valo de ploro kaj plezuroj de donna Anna".



La elŝiritaj kartoj.

Rimarko: La lastaj tri kartoj de l'manusripto estas tiel malfeliĉe disŝiritaj, ke saviĝis sur ili nek unu tuta frazo. Estas nur apartaj kaj plene nekompreneblaj por la scienculo vortoj, ekz.:

- 1) Elvira
- 2) Lisetta
- 3) Kunegunda
Vesto vasta pli maloportuna ol malvasta
- 4) Li forkuris, ĉar sentis al ŝi naŭzo
- 5) Katerino
- 6) parolis, ke ŝi estas senkulpa
- 7) perforte al li
- 8) ŝi dufoje malhonorigis la kavaliron sur la vizaĝo
- 9) li ĵuris, ke nur ŝin li amas
- 10) false ĵuris
- 11) donna Laura
- 12) diris: „do ni vojaĝu en fremdajn landojn“
- 13) Li klarigis, ke la klimato de fremdaj landoj malutilas lian san
- 14) per bastono lin tra sultroj

- 15) mi ne forlasos vin, kavaliro, ĝis la morto
- 16) la kavaliro demandis: „ĝis kies morto“?
- 17) li tre estis malkontenta
- 18) donna Vincencia
- 19) kavaliro ekpensis
- 20) ĉu ne senigis sin de
- 21) vivo
- 22) tiel maljuna kaj ŝi ankoraŭ
- 23) „ĉu mi ne estas ja virino“?
- 24) ne per jaroj mezuru mian aĝon, sed per tio,
kiel mi amas
- 25) grizaj haroj
- 26) tre malĝoja
- 27) Donna Kochinchina je tio: „Se mi turnis min
al vi kun sentemo, do ĝi estis la sentemo
de patrino; mi ne deziris, ke vi plue komu-
nikiĝu kun tiuj fiaj virinoj, tial mi oferis min.
Kaj vi tiel montris la dankemon!“
- 28) donna Anna recidiva
- 29) senbezone mi implikiĝis
- 30) stultulo
- 31) Amen.

El la pola lingvo tradukis
Br. Kuhl

of the

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..
